tempo

Gazeto de Kroata Esperanto-Ligo
Časopis Hrvatskog saveza za esperanto

julio 2002



- **5a kongreso de kroataj esperantistoj en Rijeka kun Alp-Adria Konferenco en Rijeka-Kostrena kaj Mezeŭropa konsultiĝo en Rijeka-Kostrena**
- **Leksikono de kroatiaj esperantistoj aperis**
- **Nova Plena Ilustrita Vortaro haveblas**
- **Projekto Mezeŭropo estas mia hejmo**
- **Pokalo de Kostrena 2002**

Karaj legantoj,



Ankica Jagnjić kaj Michela Lipari

Pli ol 170 personoj kolektiĝis ĉe diversaj Esperantaj programoj okazintaj de la 31a de majo ĝis la 2a de junio en Rijeka kaj Kostrena, kie paralele okazis niaj ĉefaj jaraj aranĝoj honore al 95a jara jubileo de Esperanto en Rijeka.Kunsultiĝis reprezentantoj de landaj asocioj el Aŭstrio, Ĉeĥio, Hungario, Kroatio, Slovakio kaj Slovenio. Michela Lipari nome de la estraro de UEA, taskigita pri Landa Agado, sekvis la laboron de la konsultiĝo. La konsultiĝon en la jaro 2003 invitas Pollando dum Stanislaw Mandrak transprenis la taskojn de kunordigado de la mezeŭropa komisiono. Paralele kun la konsultiĝo okazis la 14a Alp-Adria Konferenco, traktanta la temon pri Interrregiona kunlaboro per Esperanto.

Ĉiuj aranĝoj renkontiĝis per komuna programo lige al la 5a kongreso de kroataj esperantistoj en Urba Pupteatro en Rijeka. Salutis la 5an kongreson per letera mesaĝo prezidento de Respubliko Kroatio Stjepan Mesić. Persone ĉeestis la malfermon urbestro de Rijeka Vojko Obersnel kaj Josip Stanković, prezidanto de la Departamenta ĉambro Rijeka dum enkonduke prelegis Radenko Milošević.Saluton de la Prezidento de Respubliko Kroatio ni publikigas en la tradukita versio.

La aranĝoj havis riĉan muzikan programon konsistanta el tri diversaj programeroj. La koruso el Opatija bonvenige kantis kaj en posttagmezaj programoj koncertis per du apartaj koncertoj Georgo Handzlik el Pollando kaj Neven Mrzlečki el Kroatio. Drama Grupo de Studenta Esperanto-Klubo el Zagrebo kontribuis per sia teatraĵo.

Malgranda loka organiza komitato (Vjekoslav Morankić, Boris Di Costanzo, Emil Hrvatin) multe klopodis por sukcesigi la eventojn.

Aparta refreŝigo venis per la aranĝo prizorgita de Emil Hrvatin kiu aktivigis tridekon da Esperanto-lernantoj el la tuta Kroatio por scikonkurso. Diplomoj kaj elegantaj memorpokaloj restas en pluraj lernejoj en Kroatio.

Dimanĉo komencis per meso en la preĝejo de Sankta Lucija en Kostrena, celebrita de Franjo Gruić. Por la muzika orgenetoso zorgis Lucija Rusak-Orehovec.

La renkontiĝon finis ekskurso al Gorski kotar kaj ne sufiĉe konataj arbaroj Golubinjak kaj la impresdona groto.

S. Štimec

Tempo

Fondita en 1980. Ne aperis en militaj jaroj 1993 kaj 1994.
Aperas laŭeble kvarfoje jare - Jaro XXI, numero 2/2002
ISSN 0352-1583

Redakcio: Kneza Mislava 11/III, HR-10000 Zagreb, Kroatio
tel: (385 1) 46 17 550, **fakso:** (385 1) 46 19 373
rete: esperanto@zg.tel.hr
http: //pubwww.srce.hr/esperanto-kel
Tiu ĉi numero estas eldonita per helpo de Kroata Ministerio pri kulturo.
Kontribuis: Tomislav Divjak, Milka Đukić, Emil Hrvatin, Claude Piron, Stjepan Mesić, Radenko Milošević, Vjekoslav Morankić, Josip Pleadin, Vanja Radovanović, Ljerka Stilinović, SO Jin.su, Radoslav Škalamera, Spomenka Štimec
Tajpis: Spomenka Štimec
Redaktoro: Spomenka Štimec
Grafike aranĝis: Josip Pleadin
Presis: Grafokom, Durdevac, grafokom@kc.hinet.hr
Anonctarifo 1/1 paĝo 1000 kn (135 EUR), 1/2 paĝo 500 kn (68 EUR).
Abono: 4 numeroj jare 40 kn (9,5 EUR)
unuopa numero 10 kn (1,5 EUR)

La redakcio ne respondecas pri opinioj en la subskribitaj tekstoj.

REPUBLIKA HRVATSKA

PREDSJEDNIK

Al la partoprenantoj de Esperanto-aranĝoj
Alp-Adria Konferenco
Mezeŭropa konsultiĝo
Kroatia Esperanto-Kongreso

Estimataj kaj karaj partoprenantoj de la Esperanto-aranĝoj Alp-Adria Konferenco, Mezeŭropa Konsultiĝo kaj Kongreso de kroataj esperantistoj

Estas mia vera ĝojo ke post la lastjara 86a Universala Kongreso de Esperanto okazigita en Zagrebo kaj kies Alta Protektanto mi estis, mi povas saluti Esperanto-aranĝojn de Alp-Adrio, samkiel Mezeŭropan Konsultiĝon rilatantaj al ekonomia kaj alia kunlaboro en la regiono.

Mi akcentus ke ekzistas bona kunlaboro en la regiono kadre de la menciitaj asocioj kaj aparte en la kampo de ekonomio kaj alkonstruo de trafikvojoj al la direkto de Rijeka, havantaj siajn radikojn en la konataj nomoj luiziana, karolina kaj jozefina.

Mi esperas ke via serioza aliro al la problemoj de tiu ĉi regiono kaj al la ŝtatoj en la regiono, samkiel ĝenerale al la problemoj de la komuna Eŭropo, aparte per Esperanto, kontribuos ke ni ĉiuj plej bone respondu al la nuntempaj defioj en la kampoj ekonomia kaj socia, en la klopodoj de trovado de la komuna lingvo en valoraj diversecoj.

Mi deziras al vi sukcesas laboron, agrablan restadon en nia lando kaj feliĉon en la vivo.

Zagrebo, la 29an de majo 2002



Predsjednik
Republike Hrvatske
Stjepan Mesić

SOCILINGVISTIKA FENOMENO MALFACILE KOMPRENEBLA

Kio estas Esperanto? Unuavide la respondo estas simpla. Sed se esplori pli profunde, Esperanto montriĝas socilingva fenomeno multe pli kompleksa ol oni komence imagis. En ĝi interplektiĝas tiom da faktoroj el la sferoj politika, ekonomia, socia, lingvistika, estetika, psikologia, ktp, ke neniu unuopa homo nun kapablas plene kompreni ĝin. Ankaŭ la esperantistoj ne scias, vere profunde, kio kaŝiĝas sub tiu realaĵo. Kaj, miaopinie, Zamenhof mem tion ne sciis.

Oni ĝenerale rigardas Esperanton rezulto de racia, libervola decido. Sed historie, ne tiel la aferoj disvolviĝis. Jam antaŭ plenkreska aĝo, Zamenhof estis kaptita, kvazaŭ obsede, de sintruda devo ellabori projekton de lingvo interkultura. Li estis nur knabo, kiam li komencis ĝin realigi. Kiam okazis la unua konversacio en praformo de Esperanto, li ankoraŭ ne estis 20-jara.

La sento pri neeskapebla alvokiĝo, kiu devigis lin iniciati la novan lingvon, estis kvazaŭ kristaliĝo en li de ege forta, sed nur obtuze konsciata sopiro, al translima komunikado, ekzistanta ĉe multaj fine de la 19-a jarcento. Tiu kolektiva sento bezonis homon por konkretiĝi. Al ĝia alvoko la knabo Zamenhof sentis sin devigita jesi. Li estis la instrumento de sociaj kaj historiaj fortoj, kiuj ege superis lin, kiel ili superas nun ĉiun el ni.

Ke tiuj estis ege potencaj, tion pruvas la historio de la lingvo. Ĝi ja prezentas sinsekvon de krizoj, streĉiĝoj kaj situacioj ŝajne pereigaj. Sed kiu ajn la problemo, kio efektive aperas, tio estas la plej neprobabla solvo.

Preskaŭ unuanime, la lingvistoj anoncis, ke ĝi ne estos uzebla por efika interkompreniĝo, ĉar ĉiu gento uzos sian elparolon, siajn lingvostrukturoj, siajn signifkampojn (aŭ, se vi preferas fakvorti, sian semantikon), kaj ke post kelka tempo la lingvo disdialektiĝis kaj mortos. Ni realismu: ĉu ne tio estis la plej probabla? Sed la lingvoĝermo, konkrete uzata en plej diversaj cirkonstancoj, unuiĝis, firmiĝis, fariĝis riĉa, fleksebla, vere vivanta lingvo. Neniu homo kun normala sana prudento povus kredi, fine de la 19-a jarcento,ke post nur cent jaroj tiu lingvo, ĝerminta en adoleksa menso, havos interesan originalan literaturon, estos la komunikilo de multegaj internaciaj renkontiĝoj, uziĝos en urbetoj de Koreio, Novzelando, Brazilo, Interna Mongolio, kies nomoj estos ĝenerale nekonataj, kaj kiujn neniam eŭropanoj vizitas.

Tiu socilingvistika fenomeno restas grandparte mistera, sed almenaŭ unu aferon oni povas diri pri ĝi kun certeco: Esperanto estas rezistema. Ĝi spertis multajn persekutojn, ofte plej subtilajn, multajn malpermesojn kaj aliajn travivaĵojn, kiuj normale devus signi ĝian morton: ĉiujn ĝi postvivis. Eĉ progresas ĝia disvastiĝo kun, ĉefe en la lastaj dek jaroj, rimarkinda akceliĝo.

Tiu disvastiĝado, kiu okazas sen apogo politika kaj financa, kaj sen reklamado, ne eblus, se Esperanton ne portus potencaj sociaj fortoj. Sed la sociaj fortoj, kiuj dekomence kontraŭbatalas ĝin, ne estas malpli imponaj. Ili agas ĝenerale ekster la konscio, kun tiu stranga rezulto, ke honestaj homoj simple ne rimarkas, ke ili agas rilate al Esperanto kontraŭ la leĝoj de honesteco, kiujn ili cetere agnoskas kaj aplikas. Ekzemple, sincereco sentiĝas tre klare en la vortoj de la prezidanto de la eŭrop-parlamenta komisiono, kiu forĵetis en aprilo 1984 rezolucion favore al Esperanto, sen studi la faktojn. Same ĝi evidentiĝas en la motivoj, per kiuj la franca edukministro en februaro 1982 provis pravigi sian rifuzon akcepti Esperanton kiel elekteblan studobjekton lernejan. Ne studinte la dosieron, li bazis sin sur faktaj eraroj, sed estas nedubeble, ke liaj intencoj estis plej puraj. Li ne sciis pri sia nescio.

Normale, antaŭ ol verdikti, oni kolektas dosieron kaj studas la faktojn. Tiel oni faras en juro, tiel oni faras ankaŭ en industrio antaŭ ol elekti inter pluraj procedoj. Tiel oni faras same en scienco. Pri esperanto okazas male. La verdikto estas prononcata antaŭ ol dosiero kolektiĝis, la elekto farata sen komparo al rivalaj sistemoj, la fenomeno pritraktata sen rigardo al la kontrolebla realo.

Ofte oficialaj instancoj estis alvokitaj diskuti pri Esperanto, sed forĵetis ĝin antaŭ ol informiĝi. Eble la plej bela ekzemplo estas tiu de la petskribo transdonita al UN en 1966. Tiu surhavis unu milionon da individuaj subskriboj, plus la subskribojn de proksimume 4000 organizaĵoj kun entute 73-miliona membraro el 80 landoj. Sepdek tri milionoj! Verŝajne estas la plej vasta petskribo, kiu iam ajn estis prezentita en la monda historio por propono fontanta el privata iniciato ne ligita al ekonomia, ideologia, politika aŭ religia organizo. Sed tiun historie unikan eventon la plej multaj gazetoj eĉ ne menciis, kaj pri ĝi neniam debatis la Ĝenerala Asembleo de UN. La sociaj fortoj kontraŭaj al la lingvo internacia ofte sukcesas igi Esperanton tabua.

Ili tiel atingas, ke antaŭ nejusteco la socio rezignaciu. Imagu tablotenis-matĉon, en kiu unu el la ludantoj rajtas uzi la propran rakedon, dum la kontraŭulo ricevas rakedon misekvilibran, tro grandan, tro pezan, tute malsaman ol tiu, per kiu li hejme trejniĝas ĉiutage. Ĉiuj taksus tion absolute neallasebla. Egaleco de kondiĉoj estas severe postulata se temas pri pilko. Sed ne pri ideoj. Kelkaj popoloj havas la privilegion povi komuniki per lingvo, kun kiu ili estas plene familiaraj, dum al la aliaj trudiĝas esprimilo, kiu konstante devigas fortordi la buŝon kaj la menson for de ilia kutima funkciado, de la funkciado, kiu fariĝis por ili natura. Ironie estas, ke tiun por ili nekontentigan ilon ili devas pagi, multekoste kaj multapene, dum la kontraŭulo senpage ricevas sian.

Nur manko de konscio ebligas la ĝeneralan rezignacion antaŭ la nejusta hierarkiigo de la lingvoj. Esperanto forigas tiun neegalecon. Per ĝi, anstataŭ submetiĝi al la arbitraj kutimoj de la ekonomie aŭ politike pli forta, oni simple aliĝas al konvencio. La rilatoj ĉesas esti vertikalaj, ili horizontaliĝas.

Profunde en ni, io ribelas kontraŭ ĉio lingve nekonsekvenca. En la angla, ekzemple, se mi povus diri *Iwill*



arrive, "mi alvenos", kial mi ne povas diri *I will can*, "mi povos"? Kial mi devas diri *woman*, "virinoj", kaj ne povas diri *womans*, kiu estus same komprenebla? En la rusa, kial mi devas lerni diri *odin god*, "unu jaro", sed *dva goda*, "du jaroj", kun singulara genitivo, eĉ se la esprimo estas la subjekto de verbo, kaj *pjat' let*, "kvin jaroj", kun ĉi-foje plurala genitivo? En la franca, kial necesas diri *au printemps*, "printempe", sed *en hiver*, "vintre", kun malsamaj prepozicioj ĉe tute samaj konceptoj?

Se lernanto tion demandas al la instruisto, la sola respondo estas: *"Nu, estas tiel"*, kio fakte signifas: *uzu ne vian inteligentecon, sed vian memoron pri arbitraj leĝoj.* La kaŝita mesaĝo estas: *ili estas la plej fortaj, ne eblas ribeli kaj postuli ion konsekvencan aŭ adoptitan al n i a j bezonoj, klinu vin do!*

Profunde en nia psiko vivas postulo pri digneco, kiu rifuzas tiun submetiĝon. Pro ĝi streĉiĝas la rilatoj inter nederland- kaj franclingvanoj en Belgio, inter tamil- kaj sinhallingvanoj en Srilanko. Esperanto, en kiu iu ajn lingva strukturo estas plene ĝeneraligebla, kontentigas nian profundan sopiron al facileco kaj konsekvenceco en esprimado fremdlingve. Ĝi kreas etoson de libereco, de justeco, kiu igas la homojn senti sin pli digne traktataj.

Same kiel oni povas kompari kuracilojn, komputilojn aŭ industriajn procedojn, oni povas kompari unu al la alia la multajn rimedojn elpensitajn de la homoj por intergente komuniki. Eblas ekzemple komparstudi la uzon, inter malsamlingvanoj, de unu nacilingvo, kiel la angla, de samtempa buŝtradukado kaj de Esperanto. El tia esploro evidentiĝas, ke Esperanto estas pli praktika, pli rapide ekirebla, pli facile uzebla ol la ceteraj sistemoj, kaj ankaŭ ekonomie pli ŝpara, psikologie pli kontentiga, kulture pli respekta al ĉiuj. Sen observi surterene, kiel eblus scii? Tamen multaj kondamnas Esperanton sen tiu objektiva, surterena kontrolo, kio signifas rezigni samtempe racion kaj justecon; mi emus diri ankaŭ: sportan spiriton.

Nur private la ĵus menciita kompara esploro estis farita, kaj ekster ĉiu vasta influpovo. Dum tiom elspeziĝas por instrui lingvojn al infanoj kaj ĉiaaspekte solvi la problemojn de translingva komunikado, kio do malhelpas, ke oni oficiale, ĉe influhavaj instancoj, faru, por maksimumigi efikecon, komparan kost- kaj efikec-analizon? Respondon donas al ni la historio: ĉiufoje, kiam libereco kaj justeco emas progresi, potencaj sociaj fortoj mobiliziĝas kontraŭ ili, kaj ties ĉefa armilo estas malhelpi objektivan konon de la vero. Ankaŭ ĉi-kaze ili tiel agas.

Resume eblas diri jenon. Potencaj sociaj fortoj prizorgas la iom-post-ioman penetron de Esperanton en ĉiam novajn landojn kaj mediojn, same kiel la laŭgradan riĉiĝon de la kulturo bazita sur ĝi. Simile potencaj fortoj prizorgas, ke la vero pri Esperanto ne diskoniĝu, ke ne okazu pri ĝi honesta kaj malfermita debato, ke la impostpagantoj ne demandu sin, ĉu, ĉiulande, la buĝetoj pri lingva komunikado aŭ lingvoinstruado konformas al la postuloj pri pleja efikeco de la publikaj investoj. La lukto inter tiuj socaiaj fortoj prezentiĝas kiel vera dramo, sed la disvolviĝon de la dramo la publiko eĉ ne rimarkas.

Kaj ankaŭ ni, kiuj iel rolas en ĝi, ne komprenas ekzakte, kio okazas. Estas multe tro frue. Mankas la historia perpektivo, la eblo konsideri ĉion de sufiĉe alte. Tial niaj reagoj ofte ne estas trafaj. Tial ankaŭ miaj konsideroj eble ne estas trafaj. Eble mi ĉion miskomprenis, kaj prezentis fuŝe. Mi ne povas juĝi, ĉu jes aŭ ne: sed se mi ne povas juĝi, mi povas almenaŭ esperi. Mi esperas, ke mi ne tro mistrafis. Kaj ke estas vere, ke, el la vidpunkto de garantioj pri justeco, ideoj meritas tiom seriozan atenton, kiom pilko.

Claude Piron

Stjepan Lice

LA LINGVO HOMA

plantis mi vorton
kaj aŭskultas

per la sama lingvo
ĉiuj arboj parolas
ĉiu ŝtono
la falĉita herbo

per la sama lingvo
ĉiuj estaĵoj parolas

sama plorsingulto
sama ĝojkrio
traigas ĉiujn vundojn

kaj kiam iu
morti devas
al alia la vivon doni
en ĉio vibras harmonio
plena de kunsento

nur la homo
kun turmento divenas
la lingvon homan

(el *Parolo de silento - La nomo de espero*,
Zagrebo, 1993

Tradukis: Milka Đukić

Esperanto-Domo en Kostrena gastigis konkurson por lernantoj

Esperanto-domo en Kostrena

Esperanto-domo en Kostrena, Šodići 3, tel. 051-289 478, estas la ĉefa Esperanta ripozadreso en Kroatio. Ĝi troviĝas en la plej bela marborda regiono apud Rijeka. De la 31a de majo ĝis la 2a de junio 2002 ĝi gastigis Konkurson por lernantoj de elementaj lernejoj, kiuj konkurencis por Pokalo de Kostrena.

La Esperanto-Domo troviĝas 10 minutojn for de Golfo Žurkovo, kie komenciĝas la 4 km longa promenejo apud la marbordo. Proksime de la Esperanto-Domo troveblas tenisa tereno samkiel trim-vojo.

Proksime de la Esperanto-Domo troviĝas bushaltejo n-ro 10, kunliganta Kostrena kun la urbo Rijeka, en intervaloj de 20 minutoj. Esperanto-Domo foras 7 kilometrojn de la aŭtobusa stacidomo de Rijeka kaj 10 km de fervoja stacidomo Rijeka kaj 25 km de flughaveno Omišalj sur la insulo Krk. Diversaj vendejoj, bakejo, gazetkiosko kaj kuracista servo proksimas al la domo.

Eblas organizi la restadon en la servo de plena pansiono, duonpansiono aŭ per kuireja memzorgado. Eblas aranĝi semajnfinan restadon aŭ nur tranoktadon kun matenmanĝo.

La domo disponas pri la jenaj ejoj: Teretaĝo (3 dormejoj de 10, 3 kaj 2 litoj, manĝejo, kuirejo, duŝejo, necesejo), la unua etaĝo (5 dormejoj de 2, 6, 8, 8 kaj 10 litoj, eta kuirejo, teraso, 3 duŝejoj, 2 necesejoj).

Esperanto-Societo de Rijeka posedas la domon kaj ĝia partnero en ties uzado estas Asocio de skoltoj de Rijeka. (esperanto-ri@ri.tel.hr, fakso 051 228 148.)



14. ESPERANTSKA KONFERENCIJA ALPE-JADRAN
14a ALP-ADRIA ESPERANTO-KONFERENCO

5. KONGRES HRVATSKIH ESPERANTISTA
5a KONGRESO DE KROATAJ ESPERANTISTOJ

Rijeka - Kostrena
31. 5. - 2. 6. 2002.
HRVATSKA / KROATIO



Riječko filatelističko društvo "Rijeka" - broj: 98
Filatelista Socieo Rijeka, Rijeka - numero: 98

EL LA HISTORIO DE ESPERANTO EN RIJEKA

La jaro 1907 estis aparte signifa por Esperanto. Tio estis la jaro kiam finiĝis ĝuste 20 jaroj de la tago kiam aperis publike la unua libro pri la lingvo Esperanto. Tiun ĉi jubileon festis esperantistoj en ĉiuj partoj de la mondo. Finiĝis la grava etapo. La unuaj dek jaroj konsisitis el senfina, ŝajne tute sensukcesa semado, sed en la dua dekjaro de la esperantismo la longe dormintaj semoj komencis doni la unuajn trunketojn. En la jaro 1907 en la malferma parolado de la Tria Universala Kongreso okazinta en Cambridge, d-ro L.L. Zamenhof diris *"Nun nia afero estas forta. La glacia tavolo de antaŭjuĝoj estas rompita."*

En la multkultura Rijeka videblas nacie diversa konsisto de la unuaj esperantistoj en Rijeka. Josip kaj Marcel Šikić, Rikard Rack, Egidije Mihić kaj rudolf Gilić estis kroatoj, L. D' Orzcy kaj Teodoro Kovacs hungaroj, Egidio Springhet italo aŭ furlano, Antonio Schlemmer kaj A. Schnetz germanoj aŭ italigitaj germanoj. Tiutempe en Rijeka aŭdeblis krom la kroata lingvo ankaŭ la itala,germana kaj hungara lingvoj.

Historia fakto restas ke en Rijeka la unua Esperanto-organizaĵo naskiĝis la 27an de septembro 1907.



La blazono de la urbo Rijeka

Grava fonto de multaj tre interesaj faktoj pri Esperanto en nia mondoparto estas *"Riečki novi list"*. Ĝi estis la unua inter la tiamaj kroataj gazetoj kiuj propagandis Esperanton. "Riečki novi list" publikigis en du jaroj en la jaroj 1907 kaj 1908 serion de 19 notoj, informoj, raportoj kaj artikoloj pri Esperanto. En nuraj 16 monatoj "Riečki novi list" skribis pri Esperanto deknaŭ fojojn. Kial?

Kial ĝi estis antaŭulo, propagandinto de Esperanto en la tiama urbo Rijeka? "Riečki novi list" honeste registradis la faktojn pri la progresema Esperanto-Movado kaj estis la fakto ke en la tiama Rijeka relative frue ekestis esperantistoj.

"Novi list" estas la plej aĝa inter ĉiuj gazetoj en Kroatio. Ĝia fondinto estis Frano Supilo, kaj la unua numero aperis en Rijeka la 2an de januaro 1900 sub la nomo "Novi list". En la jaro 1907 ĝi ŝanĝis nomon al "Riečki novi list". Post pluraj nomŝanĝoj de 1964 ĝi nomiĝas "Novi list".

En la jaro 1904 "Novi list" eldoniĝis en 6.000 ekzempleroj tage kaj estis legita en la tuta Kroatio sed ankaŭ Vieno kaj Budapeŝto atente observadis kion mesaĝas la gazeto de Supilo. La gazeto estis konata batalinto kontraŭ la oficialaj mensogoj, kontraŭ ŝovinismaj antaŭjuĝoj kaj kontraŭ partiana politikaĉo.

Frano Supilo kaj lia "Novi list" en la jaro 1907 akre batalis kontraŭ klerikalismo, kontraŭ la aŭtonomiuloj en Rijeka, persekutintoj de ĉio kroata kaj jugoslava. En la kroata parlamento Supilo batalis kontraŭ la hungarecigo en Kroatio, kaj ĉiam kaj ĉie li batalis kontraŭ subpremado de ĉiuj popoloj en Aŭstro-Hungara Monarkio.

Aparta kaj specifa estis tiam la pozicio de la urbo Rijeka. Tiu kroata urbo tiam ne apartenis al Kroatio sed rekte al Hungario. En Rijeka estris hungara guberniestro. Sušak jam apartenis al la banusa Kroatio. Ĉio okcidente de Rijeka (ekzemple: Opatija) apartenis rekte al Vieno, al Aŭstrio. Rijeka troviĝis en la imperio Habsburga sub la guberniestro hungara.


La ideo pri la Internacia Lingvo havis en tiu regiono fervorajn adeptojn jam en la tempo de volapuko. Konata volapukisto estis profesoro Đuro Bauer, profesoro de matematiko kaj fiziko en la gimnazio de Rijeka kaj poste en la naŭtiko de Bakar. Tiu profesoro parolis ses lingvojn kaj unu jaron post Zamenhof eldonis sian lingvoprojekton Spelin. Barono D' Orczy eĉ verkis en Esperanto kaj estis premiita dum la Kvara Universala Kongreso en Dresden. Poste li fariĝis idisto.

Laŭ la notoj de Rado Škalamera



Marinko en sia mezaĝo ...

MARINKO GJIVOJE 20 jarojn post la morto



... kaj nelonge antaŭ la morto.

En la bela tempo kiam kroataj esperantistoj kongresis la kvinan fojon, ĉi-jare en Rijeka, nur malmultaj rememoris pri esperantisto, kies nomo meritas orliteran noton en nia historio.

Zagrebano laŭ loĝado, sed devene el la insulo Korčula, tiu magrulo, ĉiam serena kaj bonanima, lante sed saĝe parolanta, ĝisosta esperantisto, li donis al la Movado ne nur en Kroatio sed multe li vaste, tion kion sukcesas doni nur maloftuloj.

Mi ne volas ĉi tie prezenti lian biografion, ĉar ĝi ja aperis multloke, laste ankaŭ en la "Biografia leksikono de kroatiaj esperantistoj", sed mi volus diri kelkajn vortoj pri tio, kia li restis en mia memoro.

Kun Marinko mi konatiĝis en 1977, kiam estis fondita la unuan Esperanto-klubon en Đurđevac. Mi jam ne memoras kiu instigis min skribi al li, sed ekde tiu tempo li konstante uzis informojn ricevitajn de nia klubo kaj distribuis ilin laŭ sia maniero al redakcioj kaj unuopuloj kiuj povis uzi ilin. Ne estis tempo de komputiloj kaj de elektronika poŝto, estis tempo de "helikumado", kiam li senhezite tajpis plurajn ekzemplerojn de la sama informo kaj metis en la jam preparitajn kovertojn kaj distribuis ilin. Estis tempo de pionireco de nia informado, sed li faris tion multe pli brile ol ni tion sukcesas en la erao de komputiloj.

Kiam mi eklaboris en Internacia Kultura Servo, denove mi trovis spurojn de Marinko. La unua afero kiun mi presis en IKS estis ĝuste la paĝoj de "Panorama rigardo super la Esperanta literaturo", kiun Marinko kompilis. Poste sekvis pluraj aliaj libroj (ekz.libro pri Esperantaj bibliotekoj,), ĝis la lasta verko "Leksikono de aktivaj jugoslaviaj esperantistoj". Kun la permeso de mia direktoro, mi restadis post la kutima labortempo kaj dum miaj liberaj horoj kompostis tiun ampleksegan verkon. Estis la jaro 1982. Kvazaŭ sentante ke li baldaŭ forlasos la mondon de vivantoj, Marinko estis tre laborema, li ĉiam alportadis novajn tekstojn, telefonis kaj planis. Kvankam la kompleta kompostaĵo ne estis finita, el lia parolado vibris ĝojo. Intertempe ni amikis, mi vizitadis lin en lia domo, uzis lian bibliotekon, interesiĝis pri lia laboro kaj kiel rekompencon por mia laboro super la "Leksikono", li donacis al mi ĉiujn duoblaĵojn el sia ampleksa listo, kiujn mi deziris. Tiel mi akiris grandan parton de mia nun tre riĉa Esperanto-biblioteko.

Venis majo 1982. La 29-an kaj 30-an mi festis mian edziĝon laŭ loka tradicio. Partoprenis ankaŭ esperantistoj. Jam morgaŭan tagon, Marinko ne estis inter ni. Li forpasis la 31-an de majo 1982. Kelkajn tagojn antaŭ tio mi estis vizitinta lin, sed li malbonege fartis, li ne akceptis vizitojn. Aparatoj helpadis al li spiri. Liaj konatoj diris, ke lia malsano estas malnova, sed ke ĝi aktualiĝis post lia lasta UK, tiu en Brazilio. Li, nome, ne rajtis iri al tiel ekstrema klimato. Kio ajn estas la vero, restas nemezurebla kontribuo de Marinko al nia Esperanta ideo, al kiu li restis fidela ĝis la morto. Lia biblioteko, rezulto de sinofera laboro dum multaj jaroj, troviĝas en Nacia kaj universitata biblioteko de Kroatio, al kiu li testamentis ĝin.

Mi sentis mian moralan devon memorigi pri Marinko, almenaŭ pro tio ĉar multfoje, rimarkinte mian intereson pri Esperanta historio, li diris al mi: "Vi daŭrigos mian laboron".

Malantaŭ li restis kolosa laboro super vortaroj, Esperanta historio, literaturo, gazet-artikoloj, informado ktp. Kutime tian laboron faras teamo, sed li, fragila kia li estis, ĉion faris sola. Kiu ajn, en kiu ajn tereno de Esperanto en Kroatio (kaj ankaŭ en eksjugoslaviaj landoj) esploros, legos kaj studos, tiu senescepte trovos ian noton pri li. Tial ĉi tiu unupaĝa teksto estas nur malgranda omaĝo al Marinko, nia Mara Inko, kiu tute forkonsumiĝis por progresigo de Esperanto.

Josip Pleadin

ESPERANTO + NATURO = MKR!

Kvankam la somero ankoraŭ daŭras, esperantistoj-naturemuloj jam pensas pri aŭtuno ... ĉar ankaŭ ĉi-jare, **inter la 26-a kaj 29-a de septembro en Logarska dolina (Slovenio)**, okazos denove **MontKabana Renkontiĝo (MKR)**, jam 13-a, la renkontiĝo por naturamikoj kaj montmigremuloj.

Kelkaj vortoj pri historio de MKR: en la jaro 1989 grupo de aŭstraj junaj esperantistoj (Michael Martin, Axel Leitner, Tania Berger kaj Helmut Brath) decidis organizi renkontiĝon por amikoj de la naturo kaj migradoj en montoj. La renkontiĝo estis sukcesa kaj dum sekvaj 9 jaroj la renkontiĝo evoluis al plej konata tiuspeca aranĝo kun partoprenantoj el la tuta mondo. Post 10 MKR-jaroj, la organizadon oni transdonis al KEJA (Kroatia Esperanta Junulara Asocio) kaj trikapa teamo (Mea Bombardelli, Milivoj Uroić kaj Vanja Radovanović) jam 3 jaroj sukcese daŭrigas la tradicion. Entute, MKR-on ĝis nun partoprenis 186 esperantistoj al 18 landoj: krom eŭropaj landoj ankaŭ el Usono, Meksikio kaj Irano!

Kvankam MKR-on nun organizas kroataj esperantistoj, la aranĝo ne estas organizita nur en Kroatio, sed ankaŭ en Slovenio: jam 11-a MKR okazis en belega monttrapasejo Vršič en Julijske Alpe montaro kaj ĉi-jare ĝi okazos en ankaŭ tre ĉarma valo Logarska Dolina en Kamniške Alpe montaro. Tio ja mem havas la internacian karakteron - kroatoj organizas aranĝon en Slovenio, nur kelkajn kilometrojn for de Aŭstrio! Ankaŭ unuopaj slovenaj esperantistoj helpos al organizantoj (bedaŭrinde, slovenaj E-organizoj ne montris intereson pri la aranĝo ...) kaj ni esperos ke tia internacia aranĝo estos interesa ankaŭ por lokaj neesperantistoj.

Se la afero interesas vin, vi povas simple akiri pli da informoj - MKR jam 3 jaroj havas propran retpaĝon kie oni povas facile trovi freŝajn informojn, raportojn kun bildoj pri pasintaj MKR-oj, gazetajn artikoloj pri MKR, MKR-statistikon ... kaj, kompreneble, aliĝilon por ĉi-jara, 13-a MKR. La adreso estas

http://www.angelfire.com/va2/Vanja/index.html

Kio atendas vin ĉi-jare en Logarska Dolina? Belega naturo, freŝa aero, ĉiam vigla kaj gaja internacia etoso, ĉarma montkabano kaj ankaŭ ekskursoj kaj por fervoraj montmigremuloj kaj por promenemuloj kiujn povas partopreni ankaŭ gepatroj kun infanoj. Ĉiukaze oni vizitos du famajn akvofalojn, 75-metran Rinka kaj pli malgrandan Palenk. Krome, migremuloj vizitos kelkajn el la plej altaj pintoj de Kamniške Alpe (Ojstrica, Brana) kaj promenantoj povos ankaŭ viziti kelkajn pli malaltajn pintojn kaj ĝui la belecon promenante tra la valo.

Post tiuj enkondukaj faktoj kaj informoj eble estus interese diri iomete pli pri MKR. Unu el interesaĵoj rilatantaj al MKR estas fakto ke multaj partoprenantoj venas jam senĉese dum 5,6,7 ... kaj pli da jaroj kaj jam ekestis parto de MKR mem. Kial? Antaŭ du jaroj oni enketis MKR-partoprenantojn kaj demandis kial ili venis al la aranĝo. La plej multo diris ke konekto de umado en naturo kaj E-etoso tre plaĉas al ili. Same, multaj diris ke al ili plaĉas la "semajnfina karaktero" de MKR - oni ne bezonas preni feriojn por partopreni ĝin kaj 3-taga aranĝo estas ĝuste bela fruaŭtuna paŭzo inter someraj ferioj kaj vintraj monatoj. Krome, oni ja povas partopreni jare nur 2-3 7-tagaj E-aranĝoj ... kaj dum resto de la tempo oni ne ŝatas okupiĝi per Esperanto nur legante aŭ retumante - MKR estas bona kaj mallonga (kaj ne tro kosta) ebleco por denove vidi malnovajn amikojn kaj foje ankaŭ ekkoni novajn.

Kion la organizantoj pensas? La aŭtoro de tiu ĉi teksto dirus ke unu el ĝis nun ne multe uzataj eblecoj por disvastigi Esperanton (almenaŭ ne ĉi tie, en Mezeŭropo) estas organizado de pluraj mallongaj renkontiĝoj - ili estas pli facilaj por organizi, oni pli facile povas trovi tempon por partopreni ilin, ili estas pli malmultekostaj ... informado kaj elekto de bona aranĝenhavo estas la problemo kiuj devas esti solvita. MKR jam havas bone konatan kaj tre ŝatatan programon - estus bele se ankaŭ similaj E-aranĝoj kun aliaj temoj ekzistus.

MKR-teamo ankaŭ havas aliajn ideojn: oni pripensis organizadon de etaj semajnfinaj familiaj aranĝoj en naturo por esperantistoj el najbaraj landoj (familia MKR?). Aldone, esperantistoj el Bosnio proponis organizadon de MKR en ilia lando. Pro malproksimeco de Bosnio al meza Eŭropo de kie venas plejmulto de MKR-emuloj oni verŝajne ankoraŭ ne organizos "veran" MKR-on tie, sed iu "eta MKR" estas verŝajna - kial ne? Certe oni povas organizi similan aranĝon ie en orienta Eŭropo?

Karaj legantoj, se vi havas proprajn ideojn, proponojn ktp. bv. kontakti MKR-organizantojn kaj helpi ke MKR (kaj similaj aranĝoj) estu eĉ pli bonaj! Ĉiuj informoj pri MKR kaj similaj renkontiĝoj haveblas je jam supre menciita MKR TTT-ejo aŭ rekte ĉe organizantoj:

Vanja Radovanović (poŝte: Horvaćanska 31, HR-10 000 Zagreb; telefone: (+385) 91 365 4626; rete: vanja.radovanovic@etk.ericsson.se) ,
Mea Bombardelli (rete: mea.bombardelli@math.hr),
Milivoj Uroić (rete: muroic@phy.hr)

Kaj ne forgesu, 13-a MKR atendas vin!

Vanja Radovanović



MKR-anoj pasintjare sur Platak

PROJEKTO "MEZEŬROPO ESTAS MIA HEJMO"

Daša Chvatalova el Ĉeĥio, Viktoria Konkoly kun sia instruistino Kovacs Marta el Budapeŝto, Ivan el Maribor en Slovenio, Darko, Lovro kaj David el Zagrebo, Igor el Rijeka estas la unuaj aliĝintoj al la Projekto **Mezeŭropo estas mia hejmo**, kiu okazos en Esperanto-Domo Kostrena apud Rijeka de la 31a de aŭgusto ĝis la 8a de septembro 2002. La gastoj el eksterlando havas senpagan restadon. La tasko de la projekto estas kompari lernolibrojn pri literaturo kaj historio por mezlernejoj de Mezeŭropo. La diskutojn pri historio gvidos Gordana Jurina, kunordiganto estas Judita Rey Hudeček.

Daša proponis ke ĉiu partoprenanto preparu ion pri sia nacia muziko, kun aparta prezento de ĵazo. Oni planas ricevi enkondukon en la nacian lingvon de ĉiu partoprenanto kaj lerni ion pri la ŝatataj manĝoj de la partoprenantaj landoj.


La projekton helpas finance realigi Ministerio pri Eŭropaj Integriĝoj de Respubliko Kroatio. La projekto bonvenigas pliajn partoprenantojn el Slovenio, Lombardio, Bavario, Slovakio, Regiono Venecio-Giulia, Venetto kaj Suda Pollando, regionoj kiuj kulture konsistigas Mezeŭropon.

NOVA REDAKTORO DE KROATA ENCIKLOPEDIO - ESPERANTISTO

Akademiano Dalibor Brozović emeritiĝis de sia posteno en Leksikografa Instituto "Miroslav Krleža". Li ankoraŭ redaktoris la trian volumon de la kroata enciklopedio, tiun 800-paĝan enhavanatan kapvortojn de DA ĝis FO kaj transdonis la redaktorecon al sia ĝisnuna helpanto akademiano August Kovačec. Akademiano August Kovačec ankaŭ parolas Esperanton. Li estis membro de Honora Komitato de la 86a Universala Kongreso de Esperanto.

Estas interese konstati ke en tiu grava projekto de la kroata kulturo kunlaboras du gvidaj kroataj intelektuloj proksimaj al Esperanto.





Brozović kaj Kovačec - antaŭa kaj nova redaktoroj de Kroata enciklopedio

KIOM DA LOĜANTOJ HAVAS KROATIO?

Kiom da loĝantoj havas Kroatio? Estas konataj rezultoj de la lasta popolnombrado el 2001. En Kroatio vivas 3,977.171 kroatoj. La plej granda minoritato, la serba, konsistas el 201.631 loĝantoj aŭ 4,54%. La ceteraj minoritatoj bosnianoj, italoj, hungaroj, italoj, ĉeĥoj kaj romoj sume nombras 3% de la loĝantaro.

URBA FESTIVALO

Pluraj gejunuloj kiuj dum la preparlaboroj de la 86a Universala Kongreso de Esperanto transprenis la taskojn zorgi pri la kultura programo de la kongreso, havis la ideon lanĉi lige al la UK riĉeventan Urban Festivalon. Nikola Rašić malakceptis la Urban Festivalon en la kadron de UK ĉar ĝi ne rilatis al Esperanto. La unua Urba Festivalo tamen okazis en la tempo de UK en 2001, en la organizo de Kroata Esperanto-Junulara Asocio, prizorgata de Emina Višnić, Miroslav Jerković, Stjepan Žgela, Mia Janković kaj aliaj neesperantistaj helpantoj. La nomo de KEJA aperis sur la festivalaj afiŝoj, Esperanto estis unu el la lingvoj de la festivala broŝuro. Estu notite por la historio de la kroata kulturo, ke Amruševa 5 lulis en siaj ejoj en la unua vivfazo ankoraŭ unu teatran eventon, kiu montriĝas tradicia.

La dua Urba Festivalo okazis en julio 2002 kaj daŭros kun paŭzoj ĝis septembro, en tri etapoj. Ĝia organizanto ne plu estas KEJA, sed Loka bazo por refreŝigo de la kulturo, kun la ĉefa kunordiganto Emina Višnić.

KROATIO HAVAS NOVAN ĈEFDELEGITON

En la jaro 1992 Ivica Špoljarec fariĝis ĉefdelegito de UEA por Kroatio. Post unu jardeko en la servo, kiun li plenumis modele kaj tre sukcese, fine de ĉi-somero, li forlasas ĝin. Laŭ iniciato de Kroata Esperanto-Ligo, sendita jam komence de la jaro al Universala Esperanto-Asocio, nova Ĉefdelegito fariĝas **Josip Pleadin el Đurđevac**, UEA-membro ekde 1982. La Estraro de UEA diskutis la proponon, kaj akceptis novan ĉefdelegiton en sia kunsido la 22-an de marto. La nova ĉefdelegito kontakteblas

- per poŝtadreso: **Grkinska 1, 48350 Đurđevac,**
- telefone: **048/811-266** (oficejo), **048/812-799** (loĝejo), **098/248-574** (poŝtelefono)
- kaj rete: **grafokom@kc.hinet.hr**

SEMINARIO "ESPERANTO ĈE INTERRETO" EN ČAČAK, JUGOSLAVIO

La 3-a seminario "Esperanto ĉe Interreto" (ERI) sukcese okazis en Čačak, Jugoslavio (de la 28-a de aprilo ĝis la 5-a de majo 2002) kun la ĉeftemo "Rete lingvumi". Partoprenis 30 homoj el 13 landoj, inkluzive organizantoj kaj prelegantoj. Kroation reprezentis Dag Treer, Vladimir Dujnić kaj Tomislav Divjak.

El abunda programo menciindas:
- E-kurso por 8 komencantoj,
- kursoj por retkomencantoj pri retteknikoj, retprogramoj, kompostado kaj aspektigado de retpaĝoj,
- retprojekta metodologio kun prezentoj de ekzemplaj retprojektoj,
- laborgrupoj pri konkretaj retprojektoj,
- tradiciaj programeroj de E-renkontiĝoj: interkona, internacia, Balkana, danc- kaj adiaŭa vesperoj, sportumado, lingva festivaleto, ekokurso en Ovčar Banja.

Retprojektoj traktataj en apartaj laborgrupoj estis:
1. Balkano.net - ttt-paĝaro de Balkanaj kaj ĉirkaŭbalkanaj esperantistoj.
2. Lernu! - retejo kaj retkurso por homoj kiuj volas lerni Esperanton.
3. Lingva ĉielarko - pri lingvoj, lingva diverseco kaj lingva politiko de la Esperanto-movado.
4. tejo.org - daŭrigo de la projekto komencita ĉe EĈI-2 en Svedio, kun celo altiri novajn agantojn kaj ĉiam havi freŝajn informojn en la paĝaro de TEJO.

Tiun ĉi seminarion organizis kaj realigis la jam sperta EĈI teamo de TEJO: Hokan Lundberg, Sonja Petrović, Honning van Rosen, Bertilo Wennergren, Rolf Frolich, Clayton Smith - Argilo, Peron Chapman, Birke Dockhorn, Nastja Koĵenikova kaj Tomislav Divjak. Al ni, gejunuloj, multe helpis Radojica Petrović.

Jen kelkaj interesaj ligoj pri la seminario:
- **http://www.ikso.net/echei/2002/albumo/inex.html** (seminaria fotoalbumo)
- **http://www.ikso.net/echei/2001/partoprenantoj/janko/stat.php** (rezultoj de la fina taksado)

Tomislav Divjak

ESPERANTO - SANIGA LINGVO


En aŭgusto 2002 INA - Internacia Naturkuracista Asocio en Kolonjo (Germanio) havos sian unuan konferencon.

Judita Rey Hudeček, kiu dum multaj jaroj sekretariis en INA, prelegos pri la temo "Esperanto - saniga lingvo". En la prelego ŝi traktas principojn de Montessori-pedagogio aplikitaj al instruado de Esperanto.

INTERVJUO DE VIDA JERMAN EN "GLOBUS"



Antaŭ ol forveturi al Brazilo, Vida Jerman donis dupaĝan intervjuon al la semajna gazeto "Globus" de la 19a de julio 2002. Kvankam ŝi estis intervjuita pri sia privata vivo, Vida trovis la manierojn informi pri sia ŝatata ĉevaleto - Esperanto. Al la respondo, kio estis la plej granda sukceso en ŝia vivo, ŝi diris: "Dekminuta aplaŭdo de la internacia publiko dum la teatraĵo "La plej longa tago de Maria Teresia" antau preskaŭ mil spektantoj el 57 landoj en la Nacia teatro de Zagrebo."



STUDI, MAGISTRIĜI, DOKTORIĜI EN ESPERANTO!

Prof. Helmar Frank, prezidanto de Akademio Internacia San Marino, la 12an de julio 2002 private vizitis Zagrebon kaj profitis sian restadon por kunsidi kun la prezidantaro de KEL kaj informi pri la planata Libera Universitato Komarno en Slovakio.

Ekde la jaro 1982 Akademio Internacia San Marino, registrita laŭ la leĝoj de San Marino aktivigis preskaŭ 500 universitatajn profesorojn de plej diversaj fakoj, lekciiantaj inter Japanio kaj Argentino en diversaj universitatoj. Per ili la Akademio ebligis al interesitoj el diversaj landoj akiri akademian gradon ankaŭ per Esperanto, unu el la lingvoj de AIS.

Diplomoj de AIS estas aprobitaj en Pollando kaj Rumanio. Spertinte ke ekz. en Bavario ne eblis validigi la diplomon de AIS kun jura klarigo ke la Akademio de San Marino ne posedas proprajn konstruaĵojn, AIS nun klopodas akiri "la proprajn murojn" per la investo de akademianoj mem. Por la loko estis elektita la ĉelandlima danuba urbo Komarno en Slovakio, per ponto ligita al la samnoma hungara urbo. En la ĉefa placo de Komarno, Eŭropa Placo oni konstruis domojn en stilo de diversaj eŭropaj landoj. En la domoj estas aĉeteblaj loĝejoj. (kvadratmetro kostas malpli ol 500 eŭroj).

La Libera Universitato Komarno intencas proponi siajn servojn al diversaj minoritataoj de Slovakio por la tutjara studado sed ankaŭ per intensaj kvar-semajnaj kursoj allogi aliajn studentojn de la mondo. La ĉefaj fakoj planataj por instruado estas la plej serĉataj fakoj pri mikroekonomiko kaj manaĝerado, informatiko, komunikadscienco, psikologio, pedagogio kaj eŭrologio, nova scienco pri Eŭropo. La Nobelpremiito Reinhardt Selten jesis fariĝi rektoro de la planata Libera Universitato Komarno.

Unu el ĝiaj kunlaborantaj universitatoj estas germana universitato Hagen kun siaj spertoj pri distancaj studoj.

Kroatio ankoraŭ ne estas lando de la unuigita Eŭropo kaj atendas ĝin longa vojo antaŭ ol efektivigi tion. Sed eble iu el la juna generacio de kroataj esperantistoj volus magistriĝi aŭ doktoriĝi per Esperanto? Tio kio al la antaŭaj generacioj de esperantistoj montriĝis sciencfikcia, jam estas ebla. Ĉu vi ŝatus akiri novan diplomon? Ĉu vi ŝatus adapte-adopti vian diplomon al iu pli alta, internacia valida? Informiĝu pri la eblecoj: **www.forst.uni-muenchen.de/OTHERS/AIS/aisdeu.htm**

ESPERANTISTINO – KANDIDATO POR LA PLEJ ALTA STIPENDIO EN KROATIO



Ana Dana Beroš, studentino en la tria jaro pri arkitekturo en la Universitato en Zagreb kandidadatas kun siaj ducent kolegoj por la plej alta stipendio en Kroatio. La projekton aŭspicias gazeto "Nacional", kiu kun la foto de Ana Dana informis ke ŝi parolas angle, france kaj Esperanton, kaj uzas ankaŭ la germanan kaj la finan lingvojn. Ŝia meza noto estas 4,57. Ŝi gajnis la premion de la dekano. Legantoj de "Nacional" inter majo kaj julio povis voĉdoni por la premiota studento. Ankaŭ esperantistoj per kuponoj subtenis la elekton de Ana Dana Beroš. Kiu el ducento da bonaj studentoj efektive gajnos la premion, oni scios ĝis la nova lernojaro en aŭtuno.

VEDRAN RADOVANOVIĆ

estas knabeto kiu lernas Esperanton en sia hejmo de la gepatroj Daša Filipčić kaj Vanja Radovanović. Li naskiĝis la 10an de novembro 2000 kaj partoprenis sian unuan Esperanto-aranĝon, la 12an Montkabanan Renkontiĝon en Platak en 2001. Li planas kun la gepatroj en aŭgusto 2002 viziti la Renkontiĝon de Esperanto-familioj en Pécs en Hungario. Ĉar liaj gepatroj teatros en la somera IJS en Szekesfehervar, Vedran vizitos la etoson de la reĝa urbo. En aŭtuno li planas al Montkabana Renkontiĝo en Logarska dolina en Slovenio kun aliaj tridek esperantistoj. Ekscita estas la vivo de infano en la Esperanta familio. Agrable scii ke kreskas nova generacioj de beboj kiuj hejme lernas Esperanton.



INFANA KONKURSO EN KOSTRENA

Junulara restadejo "Esperanto Domo" Kostrena ĉi-jare gastigis lernantojn el 7 kroatiaj lernejoj kiuj partoprenis en Kroatia konkurso pri scio de Esperanto por lernantoj el elementaj lernejoj. Dudekkvar lernantoj alvenis el Slavonski Brod, Zagreb Varaždin kaj Matulji. La konkurso estis en kategorioj elementa, daŭriga kaj supera. En la konkurso estas atingitaj sekvaj rezultoj:

En la elementa kategorio:

1. Tea Šimičić el Elementa lernejo "Mladost" Zagreb,

2. Sara Bernarda Moritz, el Elementa lernejo "Gustav Krklec" Zagreb,

3. Vinka Cerovski el Elementa lernejo "Mladost" Zagreb.

Ankoraŭ du lernantinoj el tiu kategorio estas publike laŭditaj pro bone skribitaj testoj kaj ili ricevis konsolajn premiojn. Temas pri Anamarija Gudelj el Elementa lernejo "Mladost" Zagreb kaj Andela Kanjuo el Elementa lernejo "Andrija Mohorovičić" Matulji.

En daŭriga kategorio:

1. Zdravka Delić el Zagreb, aliĝinta en propra aranĝo,

2. Katarina Župan el Elementa lernejo "Antun Mihanović" Slavonski Brod,

3. Ivana Bencun el Elementa lernejo "Antun Mihanović" Slavonski Brod.

En supera kategorio neniu estas premiita.

Pokalon "Kostrena 2002" gajnis: Elementa lernejo "Mladost" Zagreb.

En daŭriga kategorio: Elementa lernejo "Antun Mihanović" Slavonski Brod.

Ses lernejoj oficiale sendis kaj finance subtenis siajn lernantojn. Ankaŭ Esperanto-societo Rijeka finance subtenis lernantojn kaj iliajn gvidantojn.

Finance kaj donace agadon subtenis:

- "Tvornica željezničkih vagona Gredelj" donacis 2.000,00 kunaojn por diplomoj kaj pokaloj.

- Eldonejo "Izvori" donacis 30 librojn "Unuiĝintaj Nacioj - Venu kun Ni" de Nana Annan al partoprenintoj de la konkurso.

- KEL kontribuis per naŭ libroj "Mirindaj aventuroj de metilernanto Hlapič" kiel premioj por la plej sukcesaj lernantoj.

- Komunumo Kostrena disponigis al ni aŭtobuson.

La konkurso okazis de la 31a de majo ĝis la 2a de junio 2002. Samtempe kaj samloke okazis renkontiĝo de mezlernejajon kiuj partoprenis en projekto "Mezeŭropo estas mia hejmo".



Labore kaj amuze



Dum la aranĝo partoprenantoj de ambaŭ projektoj amuziĝis en promenado apud la maro kaj banado. Sabaton posttagmeze ili vizitis kulturan programon de nacia Esperanto-kongreso kiu okazis tiun tagon en Rijeka kaj trarigardis la urbon Rijeka kaj kastelon Trsat. Dimanĉon matene ili ĉeestis meson en Esperanto kiun en preĝejo de Kostrena celebris Franjo Gruić.

Ĉe alveno en Kostrenan ĉiuj partoprenantoj de la aranĝo ricevis ŝildojn kaj kongresan materialon same kiel partoprenantoj de la nacia kongreso.

Sinjorino Katinjo Tosegi el "Radio Aŭstrio" intervjuis la plej sukcesajn lernantinojn.

Alp-Adria Esperanto-Konferenco, okazinta samtempe, alte taksis la aranĝon kaj rekomendis ke ĝi fariĝu tradicia kaj internacia.

Organizantoj atendas la lernantojn kaj iliajn instruistojn kaj kursgvidantojn ankaŭ la sekvontan jaron.

Emil Hrvatin



Post eldonoj en la kroata, angla, germana kaj itala, aperis ankaŭ en Esperanto plenkolora prospekto pri Hotelposeda kaj turisma entrepreno HTT "Picok" en Durđevac.

LEKSIKONO DE KROATIAJ ESPERANTISTOJ

Kroatio havas monumentan verkon pri Esperanto. En Durđevac aperis post la dujara intensa laboro de Josip Pleadin, iniciatinto, redaktoro kaj eldonisto de la libro, **Leksikono de kroatiaj esperantistoj**. La libro enhavas milon da biografioj, ofte kun fotoj, kiuj dokumentas pri la historio de Esperanto en Kroatio de post la unuaj vivsignoj pri Esperanto en Osijek en la 19a jarcento. La libro reliefas poresperantan laboron en Kroatio dum preskaŭ 115 jaroj. Ĝi estas fascina historia dokumento sed samtempe ankaŭ nuntempa adresaro, omaĝo al pioniroj, ĝisostuloj kaj kabeintoj. La libron inspiris Marinko Gjivoje kun sia verko **Leksikono de aktivaj jugoslaviaj esperantistoj**, kiu aperis post lia morto ĉe Voĉo en Borovo en la jaro 1985, finredaktita de Lucija Borčić.

Ni deziru ke ankaŭ aliaj landoj havu tian verkon pri sia kontribuo al Esperanto.

Josip Pleadin kolektas korektojn kaj kompletigojn por la iam aperonta dua eldono de la Leksikono ĉe: Grkinska 1, 48350 Durđevac, ivan.pleadin@kc.hinet.hr aŭ grafokom@kc.hinet.hr

Ĉe la lanĉo de la libro en la 5a kongreso de kroatiaj esperantistoj estis venditaj la unuaj cent ekzempleroj kaj ĝis nun iom pli ol 300! La lanĉo okazis ankaŭ en la urbo de la apero en Durđevac, la 29an de junio 2002 kadre de la fama loka kokofesto Picokijada.



AL BRAZILO! AL HUNGARIO! AL EŬROP-UNIA KONGRESO EN VERONO!

Deko da kroataj esperantistoj preparas sian vojaĝon al Brazilo. Dum la gejunuloj celas Internacian Junularan Kongreson, la aliaj por sia celo elektis Universalan Kongreson en Fortalezo. Ivo Osibov laboros kiel estrarano de UEA, Vida Jerman konstribuos al la kultura programo de la kongresa semajno, Damir Malkoč kongresos kaj turismos.

Drama Grupo de Studenta Esperanto-Klubo ankaŭ pakas valizon por partopreni en la junulara aranĝo en Szekesfehervar en Hungario. Al Balatono direktiĝas ankaŭ grupo de blindaj esperantistoj el Kroatio, celantaj partopreni Internacian Kongreson de Blindaj Esperantistoj.

Pluraj membroj preparas sian partoprenon en Verona ĉe Eŭrop-Unia Esperanto-Kongreso.

Aranĝoriĉa somero 2002!








Forpasis Đorđo Guzović

Đorđo Guzović forpasis en Rijeka la 30an de junio 2002. Li naskiĝis en Rijeka la 21an de junio 1959. Laŭ profesio li estis elktromekanikisto kaj laboris en ŝipfarejo "Viktor Lenac" en Rijeka. Esperantistiĝis en la jaro 1975 en Rijeka kaj de tiam ĝis 2002 membris en Esperanto-Societo Rijeka. De la jaro 1976 li aktivis en Sporta Esperanto-Societo en Rijeka kaj en la ŝakluda klubo. Plurfoja komitatano de Esperanto-Societo Rijeka kaj membro de LKK de SAT kongreso en Rijeka en 1981. Gvidis plurajn kursojn por komencantoj dum la okdekaj jaroj.

V. Morankić



Jen aperis la nova eldono de

PLENA ILUSTRITA VORTARO

de Sennacieca Asocio Tutmonda el Parizo, reviziita de Michel Duc Goninaz, emerita docento. En sia nova formo PIV enhavas ĉ. 16780 kapvortojn kaj ĉ. 46890 leksikajn unuojn sur 1264 paĝoj. Prezo: 70 eŭroj. Unika dokumento pri Esperanto!

NE NUR KURSLIBRO

Boris Kolker eldonis ĉe UEA la duan plobonigitan eldonon de la perfektiga kurso de Esperanto, kiu samtempe estas gvidlibro pri Esperanta kulturo. Riĉe ilustrita la verko prilumas diversajn aspektojn de Esperantujo. Estas interese noti ke sur la titopaĝo troveblas unu el la zagrebaj busoj de la firmao *Generalturist* kiuj gvidis nin en la jaro 2001 al diversaj turismaj celoj tra Kroatio. Ni memoru ke kvardeko da esperantistoj specialiĝis pri turisma gvidado por povi servi al esperantistoj-gastoj kiel gvidantoj kaj ke Kroatio konsideras sin konvinka Esperanto-Lando. Unuopaj lecionoj gvidas al diversaj fenomenoj de Esperanto-kulturo flegitaj en Kroatio ekz. verkoj de Ivo Lapenna, Emilija Lapenna, Spomenka Štimec au teatraĵo de Vida Jerman.

Korajn gratulojn al ilustra redaktoro Osmo Buller kaj grafikisto Franisco L. Veuthey kiuj dokumentite gvidas nin tra 26 lecionoj de la Esperanta pasinteco kaj la aktuala vivo.

La libro servos kiel instruilo en C-kurso kiun ekde aŭtuno en Amruševa 5 gvidos Spomenka Štimec. La libro haveblas ĉe UEA kontraŭ 18 eŭroj. Esperantujo en la libro estas ĉarme multvizaĝa kaj ties kroata parto estas stimula.



LERNANTOJ KAJ INSTRUISTOJ SALUTAS EL RIJEKA-KOSTRENA 2002

